



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 1

JANUARO 2022 Kol. 440/38

XX

Enhavo: PF 2022 Konferenco pri estonteco de Eŭropo Kalabrio
KAVA-PECH Jubileo de Vidman El la redakcio

XX

PF 2022

Karaj geamikoj,

la pasinta jaro 2021 estis tre malfacila por mi kaj por mia tuta familio. Mi esperas, ke la jaro 2022 estos pli bona. Mi scias, ke mia avino Jarmila Rýznarová kaj ankaŭ mia patrino Lenka Angelová postlasis neforgeseblajn post-signojn en nia asocio, en AEH kaj samtempe ankaŭ en la E-klubo en Pardubice. Ili ambaŭ ege mankas kaj mankos al ni. Samtempe mi scias, ke ili ambaŭ certe dezirus, ke la Esperanto daŭre vivu kaj plenumu sian rolon. Pro tio mi decidis akcepti la proponon esti prezidanto de AEH (post Lenka Angelová) kaj mi klopodos daŭrigi en iliaj spuroj, ne nur por daŭrigi familian tradicion

Mi scias, ke ni devas progresiri pluen. Tial mi deziras al ni ĉiuj prefere multe da sano kaj multe da pozitiva energio!

Elkore salutas vin Petr Angelov

Kiel oni povas kontribui al rekono kaj disvastigo de Esperanto?

Eble vi jam aŭdis pri tio, ke Eŭropa Unio lanĉis jam en la jaro 2021 lingvopolitikan debaton.

Konferenco pri la estonteco de Eŭropo.

En la debato povas partopreni ĉiu ajn civitano de EU ĝis la marto 2022. Kiu volas voĉdoni aŭ kontribui, devas unue registriĝi kaj por sekva alveno aliĝi.

Priskribon de la konferenco kaj instrukciojn, kiel aliĝi, vi trovos sur la retpaĝoj: [UEA-vikipaĝo](#)

Vi povas kaj voĉdoni por la tuta propono, kaj doni pozitivan aŭ negativan voĉon al unuopaj kontribuoj aŭ vi mem povas aldoni kontribuon aŭ respondon al iu ajn kontribuoj. La debato okazas en ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU, sed ne en Esperanto. Por ke ĉiu povu kompreni la unuopajn proponojn kaj kontribuojn, eblas klaki la butonon „Bildigi la aŭtomate tradukitan tekston“ (ĝi estas en la lingvo, kiun vi elektis). Apude estas atentigo, ke „La aŭtomataj tradukoj ne ĉiam estas 100 % precizaj“. Tion vi ofte povas sperti, ĉar kelkfoje iuj partoj de la teksto estas malfacile kompreneblaj aŭ eĉ ridindaj kaj la tradukprogramo havas problemojn ankaŭ pri la gramatiko. Eble la vorton Esperanto ĝi iam tradukas en la ĉeĥan lingvon kiel „naděje“ – espero. Ankoraŭ mi trovis vortojn, kiuj tute ne rilatas al la teksto kaj kiujn la aŭtoro verŝajne ne uzis. Tial iuj aŭtoroj aldonas esperantan tradukon de sia kontribuo. Sed la tradukprogramo strebas traduki ankaŭ ĉi tiun tekston. Evidente ĝi havas problemojn kun ĉapelitaj literoj, sed la ĝustan literon eblas

facile alpenŝi. Alie la tradukoj de Esperantaj tekstoj restas neŝanĝitaj. Kelkfoje mi trovis, ke la vorton „nun“ ĝi tradukis en la ĉeĥan kiel „jeptiška – monaĥino“.

La poresperantaj proponoj ne estas facile troveblaj, sed vi povas uzi ligilojn en la supre citita retpaĝo, kie estas listo de pli ol 40 proponoj. Sube mi listigas kelkajn el ili, por kiuj mi voĉdonis kaj ankaŭ aldonis komentojn:

[Pro objektivní, fakticky podložené informace o esperantu! Stejná práva pro řečníky esperanta!](https://futureu.europa.eu/processes/ValuesRights/f/12/proposals/41119)

<https://futureu.europa.eu/processes/ValuesRights/f/12/proposals/41119>

Por objektivaj, pruvbazitaj informoj pri Esperanto! Egalaj rajtoj por Esperantoparolantoj!

[Jeden orgán EU, kde by esperanto věci zlepšilo](https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/85075)

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/85075>

EU-institucio, kie Esperanto plibonigus aferojn

[Společný jazyk pro vytvoření Evropské unie: esperanto](https://futureu.europa.eu/processes/EUInTheWorld/f/16/proposals/86792)

<https://futureu.europa.eu/processes/EUInTheWorld/f/16/proposals/86792>

Komuna lingvo por fari la Eŭropan Union: Esperanto

[Kolik peněz by ESPERANTO ušetřilo pro Evropskou unii?](https://futureu.europa.eu/processes/Economy/f/10/proposals/32473)

<https://futureu.europa.eu/processes/Economy/f/10/proposals/32473>

Kiom da mono Esperanto ŝparus al la Eŭropa Unio?

[Šťastnější studenti jazyků, úspěšnější učitelé jazyků](https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/63064)

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/63064>

Pli feliĉaj lingvolernantoj, pli sukcesaj lingvoinstruistoj

[Oficiální uznání esperanta jako jednoho z jazyků občanů EU](https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/17955)

<https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/17955>

Oficiala agnosko de E-o kiel lingvo de EU-civitanoj

[Lepší jazykové dovednosti - lepší demokracie. Angličtina a Esperanto!](#)

<https://futureu.europa.eu/processes/Democracy/f/6/proposals/44420>

Pli bonaj lingvokonaj - pli bona demokratio. La angla kaj Esperanto!

[Účinnější pomoc díky společnému jazyku: To je esperanto.](https://futureu.europa.eu/processes/Health/f/3/proposals/86791)

<https://futureu.europa.eu/processes/Health/f/3/proposals/86791>

Pli efikaj savservoj danke al komuna lingvo: Esperanto

[Lekce o esperantu pro školáky Evropské unie](https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/39238)

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/39238>

Leciono pri Esperanto por lernejoj en Eŭropa Unio

[Zpěv evropské hymny ve společném jazyce](https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/50429)

<https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/50429>

Kanti la eŭropan himnon en komuna lingvo (= E-o)

[Esperanto – Pomocný mezinárodní jazyk](https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/1536)

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/1536>

E-o, internacia helplingvo

Krom tiuj mi trovis unu proponon, kiu rekomendas instruadon de la latina lingvo en eŭropaj lernejoj. Ĝin mi kompreneble ne subtenis, al la komentoj mi donis negativan voĉon kaj aldonis nekonsentajn komentojn:

[Propagovat latinu v evropských školách](https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/484)

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/484>

Vastigi la latinan en eŭropaj lernejoj

Voĉdoni por la propono ne bezonas multe da tempo, sed se vi volas tralegi unuopajn komentojn de kelkaj proponoj por aldoni pozitivan aŭ negativan voĉon por iuj komentoj, eĉ aldoni respondon al iu komento aŭ alskribi sian propran komenton (tio eblas nur fine post ĉiuj proponoj), tio povas daŭri eĉ plurajn horojn. Tamen atentu: voĉdoni por la propono aŭ por iu

komento eblas nur unufoje. Se vi faros tion la duan fojon, via voĉo estos nuligita.

Josef Vojáček.

Italio - Kalabrio

Malgraŭ ĉieestanta koronviroso aranĝis Vlasta Pištíková por anoj de la grupo E-mental' dek-tagan ekskurson al suda regiono de Italio, Kalabrio. Partoprenis dekopo da E-mentalanaj. Oni vojaĝis kaj aviadile, kaj vagonare, kaj aŭte. Kalabrio estas lando de montoj kaj maro.



La ekskurso okazis dum lastaj tagoj de oktobro, tiam jam por italioj la turisma sezono finiĝis. Plejparte ni ĝuis la vizitatajn lokojn sen homamasoj – kaj ni povis sur la ŝoseo marŝi „larĝe“ kaj fiera montri la Esperantan flagon ☺ . Aliflanke – ne tro da homoj ĝin povis vidi ☺ .



Iuj turismaj vojoj jam estis fermitaj, kaj kiam ni foje provis eniri belan promenejon sur klifo super maro, tuj malkovris nin marborda gardisto kaj pelis nin ĝentile, tamen kategorie, for. Tiam ni iomete timis de monpuno, sed la afero finiĝis per amika rideto.

Ni vizitis eĉ iom nekutimajn lokojn, ekzemple vilaĝeton, kiu estis devige forlasita de homoj, ĉar la domoj estis damaĝitaj de tertremo. Trista loko...

Sed plejparte ni vidis belajn kaj gajajn lokojn, renkontadis bonkorajn homojn kaj ĝuis italan



gastronomion. Ĉiu tago komenciĝis per bonega matenmanĝa supo, kiun por ni preparis Vlasta – same kiel buntan vespermanĝon! La pro-gramo poste kutime komenciĝis en kafejo aŭ dolĉaĵvendejo. Ĉu vi scias, ke la itala bonega kafo estas ege malmultekosta? Kaj poste jam ek al promeno! 15 – 20 km de



marbordo en montaron kaj reen, iam banado en la maro – sed ĉiam nekredeblaj belvidoj, pitoreskaj urbetoj, naturo, belega vetero – kaj amika etoso!

Ĉu vi ne kredas, ke ni jam mendis venontjaran ekskurson?

J. kaj M. Tomečkovi



La eldonejo KAVA-PECH 30-jara

La eldonejo KAVA-PECH de Petro Chrdle estis fondita en la jaro 1992 kaj do ĝi ĉi-jare atingos sian tridekjariĝon. Tiukaze ĝi planas solenaĵon, kiu okazos, se tion la kovim-pandemio permesos, ĵaŭde la 9-an de junio 2022 posttagmeze en la sidejo

de Unio de tradukistoj kaj interpretistoj (JTP) en Prago, Senovážné placo 23. Dume estos lanĉitaj ĉiuj novaĵoj produktitaj dum la lastaj du jaroj (pli ol duono estas aŭ en Esperanto aŭ kun rilato al Esperanto) kaj krome estos je dispono ĉiuj eldonaĵoj de KAVA-PECH kun sentebla porokaza rabato. Klare ne mankos ankaŭ la tosto kaj iom da refreŝiĝmanĝetaĵo. Ĉiuj esperantistoj interesiĝantaj pri literaturo estas kore invitataj.

Pli da informoj ĉe chrdle@kava-pech.cz

Jubileo de Čestmír Vidman

La 31-an de oktobro pasis 100 jaroj ekde la naskiĝo de la poeto kaj esperantisto Čestmír Vidman (1921–2013). Okaze de tiu ĉi jubileo nia klubo organizis solenan vesperon kun prelego kaj deklamado de poemoj. Podbrdské muzeum en Rožmitál pod Třemšínem dediĉis al la poeto unumonatan ekspozicion.

M. Turková



Vidman kun sia edzino
Jarmila
(Foto el Podbrdské
muzeum en Rožmitál
pod Třemšínem)

El la redakcio:

Nia nova prezidanto de AEH, samideano Petr Angelov en siaj vortoj esprimis ankaŭ nian volon - daŭrigi la redakcian agadon kaj labori kiel plej bone tion ebligas niaj fortoj kaj spertoj. Unue ni volas danki al niaj karaj korektantoj, danke al kiuj niaj Informilo kaj Antaŭen povas esti tiaj, kiaj ili estas. Ni ankaŭ dankas al tiuj, kiuj kunlaboras kun ni kaj sendadas al ni la artikolojn, fotojn, por ke la enhavo de la gazeto estu leginda, interesa. Firme ni kredas, ke ni kunlaboros ankaŭ en la venonta jaro. Ĉar jam pasis 5 jarojn de nia lasta kongreso de AEH ni devas plani novan kongreson por elekti novan estraron



Dum decembro 2021 falis tiom da neĝo en nia ĝardeno, ke ni sukcesis konstrui neĝfiguron kaj ni sendas al vi almenaŭ ĝian foton por ĝojigi vin.

Mirka kaj Ludmila

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.